

MESAĜO
DE LA SANKTA PATRO FRANCISKO
POR LA CELEBRO DE LA 47-a MONDA TAGO DE LA PACO
LA 1-an DE JANUARO 2014

FRATECO, FUNDAMENTO KAJ VOJO AL LA PACO

1. En tiu ĉi mia unua Mesaĝo al la Monda Tago de Paco, mi deziras adresi al ĉiuj, individuoj kaj popoloj, miajn dezirojn de vivo plena je ĝojo kaj espero. Fakte, en la koro de ĉiu viro kaj virino loĝas la deziro al plena vivo, kiu enhavas aspiron nebremseblan de frateco, impulsante al la komuneco kun la aliaj, en kiuj ni ne trovas malamikojn aŭ konkurantojn, sed fratojn, kiujn ni devas akcepti kaj brakumi.

Fakte, la frateco estas esenca dimensio de la homo, kiu estas rilatema estaĵo. La viva konscienco pri tiu rilatema dimensio kondukas nin vidi kaj trakti ĉiun homon kiel veran fratino kaj veran fraton; sen tia konscienco, fariĝas neebla la konstruado de justa socio, de firma kaj longdaŭra paco. Kaj tuj oni devas memori, ke la fratecon oni komencas lerni kutime ene de la familio, speciale danke al la respondecaj kaj komplementaj funkcioj de ĉiuj membroj, ĉefe de la patro kaj de la patrino. La familio estas la fonto de ĉia frateco, kaj tial ĝi ankaŭ estas la fundamento kaj la ĉefa vojo al la paco, ĉar, laŭ ĝia alvokiĝo, ĝi devus kontaĝi la mondon je sia amo.

La nombro ĉiam kreskanta de interligoj kaj komunikoj tra nia mondo igas pli konkreta la konscion pri la unueco kaj komuneco de la egala destino de la surteraj nacioj. Tiel, en la dinamikoj de la historio – kvankam en la diverseco de etnoj, de socioj kaj de kulturoj – ni vidas, ke estas semita la alvokiĝo formi komunumon de gefratoj kiuj sin akceptas kaj prizorgas reciproke. Tamen, eĉ nuntempe, tia alvokiĝo estas plurfoje kontraŭdirata kaj neata en la faktoj, en tiu ĉi mondo markita de la "tutmondiĝo de la nediferenteco" kiu iom post iom igas nin "alkutimiĝi" al la suferado de aliaj, fermante nin en ni mem.

En pluraj mondopartoj, daŭre oni forte damaĝas la fundamentajn homajn rajtojn, super ĉio la rajton al vivo kaj religia libereco. La tragika fenomeno de komercado de homoj, kies vivo kaj malesperado estas pritraktitaj de fihomoj, reprezentas malkvietigantan ekzemplon. Al la militoj faritaj de armitaj bataloj aldoniĝas aliaj militoj malpli videblaj, sed ne malpli kruelaj, okazantaj en la sferoj de ekonomio kaj financoj per iloj egale detruemaj al vivoj, familioj kaj kompanioj.

La tutmondiĝo, laŭ aserto de Benedikto la 16-a, najbarigas nin, sed ne fratigas nin.[1] La sennombraj situacioj de malegaleco, malriĉeco kaj maljusteco indikas ne nur profundan mankon je frateco, sed ankaŭ mankon de solidareca kulturo. La novaj ideologioj, portantaj ĝeneralan individuismon, egoismon kaj materialistan konsumismon, malfortigas la sociajn ligojn, nutrante tian pensmanieron pri la "forigebleco" kiu induktas al la malakcepto kaj forlaso de la plej malfortaj, de tiuj konsiderataj "malutilaj". Tiel, la homa kunvivado similiĝas pli kaj pli al simpla *do ut des* ("mi donas al vi, se vi donos al mi") pragmatika kaj egoista.

Samtempe, klare aperas, ke la nuntempaj etikoj mem montriĝas neefikaj por produkti aŭtentajn ligojn de frateco, ĉar frateco sen referenco al komuna Patro kiel vera fundamento ne sukcesas pluvivi.[2] Vera frateco inter homoj supozas kaj postulas transcendan patrecon. Ekde

la rekono de tia patreco, firmiĝas la frateco inter homoj, tio estas, firmiĝas tiu "proksimuliĝo" por zorgi pri la proksimulo.

"Kie estas via frato?" (Gen 4, 9)

2. Por pli bone kompreni tian alvokiĝon de la homo al frateco, por rekoni pli ĝuste la obstaklojn, kiuj metiĝas al ĝia realiĝo, kaj por identigi la vojojn por transpasi tiujn obstaklojn, estas fundamente lasi sin esti gvidata de la kono pri la deziro de Dio, lume prezentata en la Sankta Skribo.

Laŭ la rakonto pri la komenco, ĉiuj homoj venas de la samaj gepatroj, Adamo kaj Eva, paro kreita de Dio laŭ Lia bildo kaj similo (laŭ Gen 1, 26), kaj de ili naskiĝas Kain kaj Habel. En la historio de tiu unua familio, ni legas la komencon de la socio, la evoluiĝon de la rilatoj inter la homoj kaj la popoloj.

Habel estas ŝafpaŝtisto, Kain terlaboristo. Ilia profunda identeco kaj, kune, ilia alvokiĝo estas esti fratoj, en la diverseco de ilia agado kaj kulturo, de ilia maniero rilatiĝi al Dio kaj al la kreaĵaro. Sed la mortigo de Habel fare de Kain atestas tragike la radikalman malakcepton al la alvokiĝo esti fratoj. Ilia historio (laŭ Gen 4, 1-16) evidentiĝas la malfacilon de la tasko al kiu ĉiuj homoj estas alvokitaj: vivi unuece, prizorgante sin reciproke. Kain, neakceptinte la preferon de Dio al Habel, kiu oferis al Li la plej bonan parton de sia ŝafoj – "la Eternulo atentis Habelon kaj lian donacoferon; sed Kainon kaj lian donacoferon Li ne atentis" (Gen 4, 4-5) –, mortigas Habelon pro envio. Tiumaniere, li rifuzas rekoni sin kiel fraton, rilatiĝi pozitive kun li, vivi antaŭ Dio respondecante pri zorgado kaj protekto al la alia. Al la demando "Kie estas via frato?", per kiu Dio demandas Kainon pri tio, kion li faris, Kain respondas: "Mi ne scias; ĉu mi estas gardisto de mia frato?" (Gen 4,9). Poste – diras al ni la Genezo – "Kain foriris de antaŭ la Eternulo" (4,16).

Estas bezonate demandi sin pri la profundaj motivoj kiuj kondukis Kainon al ignorado de la ligo de frateco kaj, samtempe, de la nodo de reciprokeco kaj komuneco kiu ligis lin al sia frato Habel. Dio mem denuncas kaj cenzuras Kainon pro lia kunlaboro kun la malbono: "La peko kuŝos ĉe la pordo" (Gen 4, 7). Tamen, Kain ne luktas kontraŭ la malbono kaj decidas leviĝi "kontraŭ sian fraton Habel" (Gen 4, 8), rifuzante la projekton de Dio. Tiel, li frustris sian dekomencon alvokiĝon esti filo de Dio kaj vivi fratece.

La rakonto pri Kain kaj Habel instruas al ni, ke la homaro havas alvokiĝon al frateco enskribitan en si, sed ankaŭ la dramon eblon perfidi sian alvokiĝon. Atestas pri tio ĉi mem la ĉiutaga egoismo, kiu estas en la radiko de tiom da militoj kaj maljustaĵoj: multaj viroj kaj virinoj estas mortigataj per la manoj de fratoj kaj fratinoj kiuj ne scias rekoni sin kiel gefratojn, tio estas, kiel estaĵojn kreitaj al la reciprokeco, komuneco kaj sindonemo.

"Kaj vi ĉiuj estas fratoj" (Mat 23, 8)

3. Tuj aperas la jena demando: ĉu iam la viroj kaj virinoj de tiu ĉi mondo sukcesos korespondi plene al la deziro de frateco, markita en ili de Dio Patro? Ĉu ili sukcesos, nur per siaj fortoj mem, venki la nediferentecon, la egoismon kaj la malammon, kaj akcepti la legitimajn diferencojn kiuj karakterizas la fratojn kaj fratinojn?

Parafrazante liajn vortojn, ni povus tiele sintezi la respondon kiun la Sinjoro Jesuo donas: ĉar estas nur unu Patro, Dio, do ĉiuj vi estas fratoj (laŭ Mat 23, 8-9). La radiko de la frateco estas en la patreco de Dio. Ne temas pri patreco nedeterminita, nediferenca kaj historie neefika, sed pri persona, helpema kaj eksterordinare konkreta amo de Dio al ĉiu homo (laŭ Mat 6, 25-30). Do, temas pri patreco kiu efike generas fratecon, ĉar la amo de Dio, kiam oni ĝin akceptas, fariĝas la plej mirinda aganto por transformado de la vivo kaj de la rilatoj al la aliaj, malfermante la homojn al la solidareco kaj reciprokeco.

Specife, la homa frateco estas regenerita en kaj per Jesuo Kristo pro lia morto kaj resurekto. La kruco estas la definitiva "loko" kie fondiĝas la frateco, kiun la homoj ne kapablas generi per si mem. Jesuo Kristo, kiu eniris en la homan naturon por elaĉeti ĝin, amante la Patron ĝis la morto sur kruco (laŭ Fil 2, 8), per sia resurekto konstituis nin kiel novan homaron, en plena komuneco kun la volo de Dio, kun Lia projekto, kiu enhavas la plenan realiĝon de la alvokiĝo al la frateco.

Jesuo prenas sur sin ekde la komenco la projekton de Dio, donante al Li la regadon super ĉiuj aferoj. Sed Kristo, per sia sindono al la morto pro amo al la Patro, fariĝas principo nova kaj definitiva al ĉiuj ni, alvokitaj rekoni nin kiel fratojn en Li, gefiloj de la sama Patro. Li estas la Interligo mem, la persona loko de repaciĝo de la homoj al Dio, kaj de la gefratoj inter si. En la morto sur kruco de Jesuo, ankaŭ estas transpaŝita la divido inter popoloj, inter la popolo de Interligo kaj la popolo de Paganaj, senigita de la espero, ĉar ĝis tiam, tiu ĉi popolo estis fremda al la paktoj de la Promeso. Laŭ ni legas en la letero al la Efesanoj, Jesuo Kristo repacigas en si ĉiujn homojn. Li estas la paco, ĉar el la du popoloj li kreis nur unu popolon, faligante la muron de divido inter ili, la malamikecon. Li kreis en si mem nur unu popolon, nur unu novan homon, nur unu homaron (laŭ Efe 2, 14-16).

Kiu akceptas la vivon de Kristo kaj vivas en Li, tiu rekonas Dion kiel Patron kaj sin donas tute al Li, amante Lin super ĉiuj aferoj. La repacigita homo vidas en Dio la Patron de ĉiuj kaj, sekve, sentas la alvokon vivi fratecon malfermitan al ĉiuj. En Kristo, la alia homo estas akceptata kaj amata kiel filo aŭ filino de Dio, kiel frato aŭ fratino, ne kiel fremdulo, nek kiel kontraŭulo aŭ malamiko. En la familio de Dio, kie ĉiuj estas gefiloj de unu sama Patro kaj ĉiuj estas enmetitaj en Kristo, filoj en la Filo, ne estas "forĵetendaj vivoj". Ĉiuj ĝuas egalan kaj netuŝeblan dignecon. Ĉiuj estas amataj de Dio, ĉiuj estas elaĉetitaj de la sango de Kristo, mortinta sur kruco kaj resurektita favore al ĉiuj. Tiu ĉi estas la motivo, pro kiu ni ne povas esti indiferentaj antaŭ la situacio de la gefratoj.

La frateco, fundamento kaj vojo al la paco

4. Post ĉi tiu premo, estas facile kompreni, ke la frateco estas fundamento kaj vojo al la paco. La socialaj Enciklikoj de miaj Antaŭantoj donas valoran helpon rilate al tio. Sufiĉas vidi la difinojn de paco ĉe *Populorum progressio*, de Paŭlo VI, aŭ ĉe *Sollicitudo rei socialis*, de Johano Paŭlo la 2-a. De la unua, ni lernas, ke la kompleta disvolviĝo de la popoloj estas la nova nomo de la paco[3] kaj, de la dua, ke la paco estas la *opus solidaritatis*, frukto de la solidareco.[4]

Paŭlo la 6-a asertas, ke kaj la homoj kaj la nacioj devas renkontiĝi en spirito de frateco. Kaj li klarigas: «En tiu kompreniĝo kaj amikeco reciprokaj, en tiu sankta komuneco, ni devas (...) labori kune por konstrui la komunan estontecon de la homaro».[5] Tiu devo estas unue de la plej favorataj. Iliaj devoj radikiĝas ĉe la frateco homa kaj supernatura, prezentitaj laŭ triobla

aspekto: la devo de solidareco, kiu postulas la helpon de la riĉaj nacioj al la malpli disvolviĝintaj; la devo de sociala justeco, kiu postulas la reformuladon, en esprimoj pli konkretaj, de la difektitaj rilatoj inter popoloj fortaj kaj popoloj malfortaj; la devo de universala karitato, kiu implicas la promocion de mondo pli humana al ĉiuj, mondo kie ĉiuj havu ion ajn por doni kaj por ricevi, sen ke la progreso de unuj estu obstaklo al la disvolviĝo de aliaj.[6]

Se oni konsideras la pacon kiel *opus solidaritatis*, ne eblas ne pensi, ke ties ĉefa fundamento estas la frateco. La paco, asertas Johano Paŭlo la 2-a, estas nedividebla bono: aŭ ĝi estas ĉies bono, aŭ ĝi estas nenies. Fakte, la paco nur povas esti konkerita kaj uzata kiel pli bona vivkvalito kaj kiel disvolviĝo pli humana kaj subtenebla se en ĉiuj vivas "la deziro firma kaj persista labori por la komuna bono".[7] Tio implicas ne lasi sin esti gvidata de la "profitavideco" kaj de la "soifo je potenco". Nepras esti preta "perdiĝi" por la bono de la proksimulo anstataŭ ekspuati lin, kaj "servi lin" anstataŭ subpremi lin favore al sia profito (...). La "alia" – homo, popolo aŭ nacio – [ne devas esti rigardata] kiel ia ajn ilo, por ekspluati, kontraŭ malalta pago, la kapablon labori kaj la fizikan reziston, por poste forlasi lin tiam, kiam li ne plu utilas; sed kiel nia 'similulo', 'helpanto'.[8]

La kristana solidareco supozas, ke la proksimulon oni amu ne nur kiel "homon kun rajtoj kaj fundamenta egaleco rilate al ĉiuj aliaj, sed [kiel] la vivantan bildon de Dio Patro, elaĉetita de la sango de Jesuo Kristo kaj farita objekto de la senĉesa agado de la Sankta Spirito",[9] kiel fraton. "Tiam, la konscio de la komuna patreco de Dio, de la frateco de ĉiuj homoj en Kristo, 'gefiloj en la Filo', kaj de la ĉeesto kaj la viviganta agado de la Sankta Spirito koncedos – memoras Johano Paŭlo la 2-a – al nia rigardo pri la mondo kvazaŭ novan kriterion por interpreti ĝin",[10] por transformi ĝin.

La frateco, premiso por venki la malriĉecon

5. En *Caritas in veritate*, mia Antaŭulo memorigis al la mondo, ke grava motivo de la malriĉeco estas la manko de frateco inter popoloj kaj inter homoj.[11] En multaj socioj, ni sentas profundan interrilatan malriĉecon, pro la manko de firmaj rilatoj familiaj kaj komunumaj; ni maltrankvile vidas la kreskadon de malsamaj specoj de mankoj, marĝenigo, soleco kaj de pluraj formoj de malsaneca dependo. Tia malriĉeco nur estas superebla per remalkovro kaj valorigo de fratecaj rilatoj ene de familioj kaj komunumoj, per la kundivido de ĝojoj kaj malĝojoj, de malfacilaĵoj kaj sukcesoj, kiuj ĉeestas en la vivo de la homoj.

Krome, se unuflanke oni konstatas redukton de absoluta malriĉeco, aliflanke ni ne povas ne rekoni gravan altiĝon de relativa malriĉeco, tio estas, de la malegaleco inter homoj kaj grupoj, kiuj kunvivas en specifa regiono aŭ en determinita historia-kultura kunteksto. Ĉi-sence, estas utilaj la efikaj politikoj kiuj akcelu la principon de frateco, garantianta al la homoj – egalaj je sia digneco kaj en siaj fundamentaj rajtoj – aliron al la «kapitaloj», al servoj, al rimedoj edukaj, sanitaraj kaj teknologiaj, por ke ĉiu el la homoj havu oportunon esprimi kaj realigi sian viv-projekton kaj povu disvolviĝi plenumane.

Oni rekonas, ke ankaŭ estas bezonataj politikoj, kiuj utilu al redukto de la troa malegaleco je salajroj. Ni ne devas forgesi la instruon de la Eklezio pri la tiel nomata sociala hipoteko, laŭ kiu, se licas – laŭ Sankta Tomaso de Akveno – kaj eĉ nepras, ke "la homo havu proprajon de la varoj"[12] koncerne la uzadon, li tamen "ne devas konsideri la eksterajn aferojn kiujn li lice

posedas nur kiel proprajn aferojn, sed ankaŭ kiel komunajn aferojn, tiel ke ili donu profiton ne nur al li, sed ankaŭ al la aliaj".[13]

Fine, ekzistas formo por akceli la fratecon – kaj, tiel, venki la malriĉecon – kiu devas esti en la bazo de ĉiuj aliaj formoj. Temas pri la malavaro travivata de tiuj, kiuj elektas vivstilojn sobrajn kaj esencajn, de tiuj, kiuj, dividante siajn riĉaĵojn, sukcesas tiumaniere sperti la fratecan komunecon kun aliaj. Tio estas fundamenta premiso por sekvi Jesuon Kriston kaj esti vera kristano. Tiu estas la kazo de nur de konsekritaj homoj kiuj eldiras voton de malriĉeco, sed ankaŭ de multaj familioj kaj respondecaj civitanoj kiuj firme kredas, ke la frateca rilato al la proksimulo estas la plej kara bono.

La retrovo de frateco en la ekonomio

6. La gravaj financaj kaj ekonomiaj krizoj de la nuntempo - kiuj devenas de la laŭpaŝa distancigo de la homaro disde Dio kaj la proksimulo, de la monavida postkuro al materialaj varoj unuflanke, kaj de la malriĉigo de interhomaj kaj komunumaj rilatoj aliflanke - instigis la homaron serĉi kontenton, feliĉon kaj sekurecon en konsumo kaj enspezoj laŭ skalo tute misproportia kompare kun la principoj de sana ekonomio. En 1979, Johano Paŭlo la 2-a atentigis pri “vere perceptebla danĝero, nome, ke kvankam la superrego de la homaro super la mondo de aĵoj faras grandegajn antaŭenirojn, homoj povus perdi la esencajn fadenojn de sia superrego, kaj diversmaniere lasu ke sia homeco estu submetita al la mondo kaj mem fariĝu la objekto de manipulado multrilate - eĉ se la manipulado ofte ne estas rekte videbla - per la tuta organizado de la vivo de la komunumo, per la sistemo de produktado kaj per premo de la socikomunikiloj” [14].

La sinsekvo de ekonomiaj krizoj devus estigi ĝustatempan rekonsideron pri modeloj de ekonomia evoluo kaj ŝanĝon de vivmanieroj. La hodiaŭa krizo, eĉ kun siaj gravaj eventualaj sekvoj rilate al la vivoj de homoj, ankaŭ povas disponigi al ni fruktodonan ŝancon trovi la virtojn de prudento, modereco, justeco kaj forto. Ĉi tiuj virtoj povas helpi nin superi malfacilajn momentojn kaj trovi la fratulajn ligojn kiu unuigas nin unu al la alia, kun profunda konfido, ke homoj bezonas - kaj kapablas atingi - ion pli grandan ol maksimumigi sian individuan intereson. Antaŭ ĉio, ĉi tiuj virtoj estas necesaj por konstrui kaj konservi socion, kiu akordas kun la homa digno.

Frateco estingas militon

7. En la pasinta jaro, multaj el niaj gefratoj ankoraŭ eltenis la detruan sperton de milito, kio konsistigas gravan kaj profundan vundon truditan al frateco.

Multaj konfliktoj aktuale okazas dum ĝenerala indiferenteco. Al ĉiuj, kiuj loĝas en landoj kie armiloj trudas terorismen kaj detruon, mi certigas mian propran proksimecon kaj tiun de la tuta Eklezio. Ĉi tiu havas la mision alporti la amon de Kristo al la sendefendaj viktimoj de forgesitaj militoj per siaj preĝoj por paco, sia servo al la vunditoj, la malsatantoj, rifuĝintoj, la delokitoj kaj al ĉiuj, kiuj vivas en timo. La Eklezio ankaŭ eldiras por aŭdigi al gvidantoj la krion de doloro de la suferantoj kaj por ĉesigi ĉian formo de malamikeco, de fitrakto kaj la malobservon de fundamentaj homaj rajtoj.[15]

Ĉi tial, mi forte pledas al ĉiuj, kiuj semas perforton kaj morton per armita forto: en la persono kiun vi hodiaŭ vidas nur kiel malamikon kiu estu venkita, eltrovu male vian fraton aŭ fratinnon,

kaj detenu vian manon! Forlasu la vojon de armiloj, kaj eliru renkonti la aliulon en dialogo, pardono kaj repacigo, por rekonstrui justecon, fidon kaj esperon ĉirkaŭ vi! “De ĉi tiu starpunkto, estas klare ke, por la popoloj de la mondo, armitaj konfliktoj ĉiam estas intenca nuligo de internacia konkordo, kaj kreas profundajn disigojn kaj disŝirajn vundojn, kies resanigo postulas multajn jarojn. Militoj estas konkreta rifuzo plutrakti la grandajn ekonomiajn kaj sociajn celojn fiksitajn por si de la internacia komunumo”. [16]

Malgraŭ tio, dum cirkulos la nuntempa granda kvanto de armiloj, nova preteksto ĉiam troveblas por iniciati bataladon. Ĉi tial, mi faras mia propra la pledon de miaj antaŭuloj por la nedismultiĝo de armiloj kaj por senarmiĝo de ĉiuj partioj, kun, komence, senarmiĝo je atomaj kaj kemiaj armiloj.

Ni ne povas, tamen, ne rimarki ke internaciaj interkonsentoj kaj naciaj leĝoj - kvankam necesaj kaj tre dezirindaj - ne per si mem sufiĉas por protekti la homaron kontraŭ la risko de armita konflikto.

Necesas konvertiĝo de koroj, kiu ebligus al ĉiuj ekkoni en la aliulo fraton aŭ fratinnon prizorgendan kaj kunlaborindan, en la konstruo de fruktoplena vivo por ĉiuj. Ĉi tiu estas la spirito, kiu inspiras multajn iniciatojn de la civila socio, inter ili religiaj organizaĵoj, por progresigi interpacigon. Mi esprimas mian bondeziron, ke la ĉiutaga sindevontigo de ĉiuj daŭre montriĝos sukcesa kaj ke estos efika apliko en la internacia juro de la rajto je paco, kiel fundamenta homa rajto kaj necesa antaŭkondiĉo por ĉiu alia rajto.

Korupto kaj mafismo minacas fratecon

8. La horizonto de frateco ankaŭ koncernas la bezonon de sinplenumo fare de ĉiu viro kaj virino. La legitimaj ambicioj de homoj, precipe en la kazo de la junularo, devus ne esti malhelpataj aŭ ofendataj, nek estu homoj senigitaj je sia espero ke ili realigos tiujn ambiciojn. Tamen, oni devas ne konfuzi ambicion kaj la misuzon de povo. Male, homoj devus konkuri inter si pri reciproka estimo (kp. Romanoj 12:10). En disputoj, kiuj ankaŭ estas neevitebla parto de la vivo, ni ĉiam memoru ke ni estas gefratoj, kaj tial ni instruu kaj al aliuloj kaj al ni mem ne rigardi nian proksimumon kiel malamikon aŭ oponanton eliminendan.

Frateco estigas socian pacon ĉar ĝi kreas ekvilibron inter libereco kaj justeco, inter propra respondeco kaj solidareco, inter la bono de individuoj kaj la bono komuna. Sekve, politika komunumo devas agi laŭ malkaŝema kaj respondeca maniero por favori ĉion ĉi. Estas necese ke civitanoj sentu sin reprezentataj de la publikaj aŭtoritatuloj kun respekto pri sia libereco. Sed ofte oni enbatas kojnon inter civitanoj kaj institucioj fare de partecaj interesoj kiuj malbeligas tiun interrilaton, kaj tiel instigas daŭran etoson de konflikto.

Aŭtenta spirito de frateco superas la individuan malsindonon kiu konfliktas kun la kapablo de homoj vivi en libereco kaj konkordo inter si. Tia malsindono disvolviĝas socie - ĉu en la multaj formoj de korupto, tiel vastaj hodiaŭ, ĉu en la starigo de krimaj organizaĵoj, de grupetoj ĝis grupoj organizitaj laŭ tutmonda skalo. Ĉi tiuj grupoj detruas laŭleĝecon kaj justecon, atakante la koron mem de la digno de la persono. Ĉi tiuj organizaĵoj grave ofendas Dion, ili dolorigas aliulojn kaj ili malutilas al la kreaĵaro, des pli kiam ili havas religiajn nuancojn.

Mi ankaŭ pensas pri la korŝira dramo de narkotismo, kiu rikoltas profitojn montrante malestimon pri la morala kaj civila leĝoj. Mi pensas pri la ruiniĝo de naturaj rimedoj kaj

daŭranta poluado, kaj pri la tragedio de la ekspluato de laboristoj. Mi pensas ankaŭ pri kontraŭleĝa monlavado kaj financa spekulado kiuj ofte montriĝas kaj predaj kaj malutilaj por tutaj ekonomiaj kaj sociaj sistemoj, submetante milionojn da viroj kaj virinoj al malriĉeco. Mi pensas pri prostituado, kiu ĉiutage rikoltas senkulpajn viktimojn, precipe junajn, forprenante al ili ilian estontecon. Mi pensas pri la abomenaĵo de la ŝakrado de homaj estuloj, krimoj kaj fitraktoj kontraŭ neplenaĝuloj, la hororo de sklaveco kiu ankoraŭ restas en multaj mondopartoj; la ofte preteratentita tragedio de migrintoj, kiuj ofte estas viktimoj de hontinda kaj kontraŭleĝa manipulado. Kiel papo Johano la 23a skribis: “Socio bazita sur interrilatoj de potenco neniel estas humana. Ĝi tute ne - kiel ĝi devus - instigas ĉe homoj la atingon de kreskado kaj perfekteco, sed male montriĝas subprema kaj restriкта je ilia libereco”. [17] Sed homoj ja povas sperti konvertiĝon; ili devas neniam perdi la esperon ke ili povas ŝanĝi siajn vivojn. Mi volas, ke ĉi tio estu mesaĝo de espero kaj konfido por ĉiuj, eĉ por tiuj, kiuj faris brutalajn krimojn, ĉar Dio ne deziras la morton de la pekulo, sed ke tiu konvertiĝu kaj vivu (kp. Jehezkel 18,23).

En la larĝa kunteksto de homaj sociaj rilatoj, kiam ni konsideras krimon kaj punon, ni ne povas ne pensi pri la malhumanaj kondiĉoj en tiel multe da prizonoj, kie la malliberigitoj ofte estas reduktitaj al subhoma statuso, kio malobservas ilian homan dignon kaj malkreskigas ilian esperon kaj deziron al rehabilitado. La eklezio faras multon en ĉi tiuj medioj, plejparte silente. Mi alvokas kaj instigas al ĉiuj fari pli, esperante ke la penoj, farataj en ĉi tiu kampo de tiel multe da kuraĝaj viroj kaj virinoj, estos ĉiam pli subtenataj, juste kaj honeste, ankaŭ de la civilaj aŭtoritatuloj.

Frateco helpas konservi kaj kultivi la naturon

9. La homa familio ricevis de la Kreinto komunan donacon: la naturo. La kristana vidpunkto pri la kreitaro inkluzivas pozitivan juĝon pri la legitimeco de intervenoj al la naturo se tiuj celas esti bonaj por ĝi kaj estas farataj respondece, nome, se ili agnoskas la “gramatikon” gravuritan en la naturo kaj prudente uzas rimedojn bonfare al ĉiuj, kun respekto pri la beleco, celeco kaj utileco de ĉiu vivaĵo kaj ĝia loko en la ekologia sistemo. La naturon, resume, ni disponas, kaj ni estas alvokitaj plenumi respondecan intendantecon super ĝi. Sed tre ofte ni estas inspirataj de avareco kaj de la aroganteco de superrego, posedo, manipulado kaj ekspluato; ni ne konservas la naturon; nek ni respektas ĝin aŭ rigardas ĝin kiel komplezan donacon kiun ni devas prizorgi kaj servi al niaj gefratoj, inter ili estontaj generacioj.

Laŭ aparta maniero, la agrikultura sektoro estas la primara produktiva sektoro kun la kerna alvokiĝo kultivi kaj protekti naturajn rimedojn por nutri la homaron. Ĉi-rilate, la daŭra malhonoro de malsato en la mondo igas min fari al vi la demandon: Kiel ni uzas la rimedojn de la tero? Nuntempaj socioj devus pripensi la hierarkion de prioritatoj al kiu produktado estas direktata. Estas vere urĝa devo uzi la rimedojn de la tero tiel, ke ĉiuj povu esti liberaj je malsato. Iniciatoj kaj eblaj solvoj estas multaj, kaj ne estas limigitaj al pliigo de produktado. Ĉiuj scias, ke la nuna produktado sufiĉas, kaj tamen milionoj da homoj ankoraŭ suferas kaj mortas pro malsato, vera skandalo. Ni devas, do, trovi metodojn per kiuj ĉiuj povu profiti de la fruktoj de la tero, ne nur por eviti la larĝiĝantan diferencon inter tiuj, kiuj havas pli kaj tiuj, kiuj devas sin kontentigi per la paneroj, sed, antaŭ ĉio, ĉar temas pri justeco, egaleco kaj respekto al ĉiu homo. Ĉi-rilate, mi volas rememorigi ĉiujn pri tiu necesa universala celo de ĉiuj varoj kiu estas unu el la fundamentaj principoj de la socia instruo de la eklezio. Respekto al ĉi tiu principo estas la esenca kondiĉo por peri efikan kaj justan aliron al tiuj esencaj kaj primaraj varoj, kiujn ĉiu homo bezonas kaj kiujn li aŭ ŝi rajtas.

Konkludo

10. Frateco devas esti eltrovata, amata, spertata, proklamata kaj priatestata. Sed sole amo, donita kiel donaco de Dio, ebligas nin akcepti kaj plene sperti fratecon.

La necesa realismo konvena por la politiko kaj la ekonomio ne povas esti reduktita al nura teknika kompetenteco senigita je idealoj kaj indiferenta pri la transcenda dimensio de la homo. Kiam ĉi tiu malfermiteco al Dio mankas, ĉiu homa agado estas malriĉigita kaj homoj estas reduktitaj al objektoj kiuj povas esti ekspluatataj. Nur kiam la politiko kaj la ekonomio akceptas moviĝi ene de la larĝa spaco sekurigita de Tiu, Kiu amas ĉiun viron kaj ĉiun virinon, ili tiam povos esti strukturitaj sur bazo de vera spirito de fratula karitato kaj fariĝi efikaj instrumentoj de kompleta homa evoluado kaj paco.

Ni kristanoj kredas, ke en la eklezio ni ĉiuj estas membroj de ununura korpo, ĉiuj reciproke necesaj, ĉar al ĉiu estas donita graco, laŭ la mezuro de la donaco de Kristo, por la komuna bonfarto (kp. Ef 4.7,25; 1 Kor 12,7). Kristo venis al la mondo por alporti al ni la dian gracon, tio estas, la eblecon partopreni sian vivon. Ĉi tio necesigas teksu teksaĵon el fratulaj interrilatoj markitan de reciprokeco, pardonemo kaj kompleta sindonemo, laŭ la amplekso kaj la profundo de la amo de Dio proponata al la homaro en Tiu, Kiu, krucumite kaj leviĝinte, altiras ĉiujn al si: “Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.” (Johano 13,34-35). Ĉi tiu estas la bona novaĵo kiu postulas de ĉiu elpaŝon, konstantan praktikon de simpatio, de aŭskultado al la sufero kaj la esperoj de aliuloj, eĉ tiuj plej malproksimaj de mi, kaj piediri laŭ la postulema vojo de tiu amo kiu scias kiel libere doni kaj elspezi sin bonfare al ĉiuj niaj gefratoj.

Kristo brakumas la tutan homaron kaj volas ke neniu estu perdita. “Ĉar Dio sendis Sian Filon en la mondon, ne por juĝi la mondon, sed por ke la mondo per li estu savita.” (Joh 3,17). Tion li faras sen subpremi aŭ devigi iun ajn malfermi al li la pordojn de la koro kaj la menso. “Kiu estas la pli granda el vi, tiu fariĝu kiel la pli juna; kaj tiu, kiu estas ĉefa, kiel la servanto” - Jesuo Kristo diras - “mi estas meze de vi kiel la servanto” (Luk 22,26-27). Sekve, ĉiu agado devas esti markita de sinteno de servo al homoj, precipe al tiuj plej malproksimaj kaj malpli konataj. La servo estas la animo de tiu frateco kiu konstruas pacon.

Ke Maria, la Patrino de Jesuo, helpu nin kompreni kaj travivi ĉiutage la fratecon kiu ekfontas el la koro de sia Filo, por alporti pacon al ĉiu homo sur ĉi tiu nia amata tero.

El Vatikano, la 8an de decembro 2013

Francisko

** Piednotoj **

- [1] Kp. Encikliko *Caritas in Veritate* (la 29a de junio 2009), 19: AAS 101 (2009), 654-655.
- [2] Kp. Francisko, Encikliko *Lumen Fidei* (la 29a de junio 2013), 54: AAS 105 (2013), 591-592.
- [3] Kp. Paŭlo la 6a, Encikliko *Populorum Progressio* (la 26a de marto 1967), 87: AAS 59 (1967), 299.
- [4] Kp. Johano Paŭlo la 2a, Encikliko *Sollicitudo Rei Socialis* (la 30a de decembro 1987), 39: AAS 80 (1988), 566-568.
- [5] Encikliko *Populorum Progressio* (la 26a de marto 1967), 43: AAS 59 (1967), 278-279.
- [6] Kp. samloke., 44: AAS 59 (1967), 279.
- [7] Encikliko *Sollicitudo Rei Socialis* (la 20a de decembro 1987), 38: AAS 80 (1988), 566.
- [8] Samloke, 38-39: AAS 80 (1988), 566-567.
- [9] Samloke, 40: AAS 80 (1988), 569.
- [10] Samloke.
- [11] Kp. Encikliko *Caritas in Veritate* (29 Junio 2009), 19: AAS 101 (2009), 654-655.
- [12] *Summa Theologiae* II-II, q. 66, art. 2.
- [13] Dua Vatikana Ekumena Konsilio, Pastra Konstitucio pri la eklezio en la moderna mondo *Gaudium et Spes*, 69; kp. Leono la 13a, Encikliko *Rerum Novarum* (la 15a de majo 1891), 19: ASS 23 (1890-1891), 651; Johano Paŭlo la 2a, Encikliko *Sollicitudo Rei Socialis* (la 30a de decembro 1987), 42: AAS 80 (1988), 573-574; Pontifika Konsilio por Justeco kaj Paco, Kompendio de la socia doktrino de la eklezio, 178.
- [14] Encikliko *Redemptoris Hominis* (la 4a de marto 1979), 16: AAS 61 (1979), 290.
- [15] Kp. Pontifika Konsilio por Justeco kaj Paco, Kompendio de la socia doktrino de la eklezio, 159.
- [16] Francisko, Letero al prezidanto Putin, la 4a de septembro 2013: *L'Osservatore Romano*, la 6a de septembro 2013, p. 1.
- [17] Encikliko *Pacem en Terris* (la 11a de aprilo 1963), 17: AAS 55 (1963), 265.

Tradukis: Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos (Brazilo) kaj Mike Leon (NovZelando)
Lingve kontrolis: Antonio De Salvo

IKUE:

www.ikue.org

www.facebook.com/pages/Internacia-Katolika-Unuiĝo-Esperantista/263471327120529